

BOLETIM INFORMATIVO DA
ASSOCIAÇÃO PORTUGUESA
DE ESPERANTO



NIA BULTENO

INFORMA BULTENO DE
PORTUGALA ESPERANTO ASOCIO

R. Dr. João Couto 1238 r./c. A Tel 741359 LISBOA 4

Marto - Aprilo 1975 N.º 1

NIA BULTENO, dumonata organo de Portugala Esperanto-Asocio, kiu komencas publikiĝi, salutas la esperantajn gazetojn, organizaĵojn kaj la samideanaron tutmondan.

Post longjara inerteco kaj silentado, altrudita de la faŝisma regformo, oni klopodas propagandi Esperanton kaj grupigi la anaron.

La nuntempa politika streĉiĝo ne favoras la tujan disvolviĝon de nia enlanda movado. Sed P.E.A., kiu celas disvastigi la Internacian Lingvon kaj akceli inter ni esperantan kulturon, diligentos, ke en baldaŭa estonto Esperanto denove disfloros en Portugalio.

La interŝanĝo kun la esperanta gazetaro ebligos plenigi la paĝojn de Nia Bulteno per taŭga internacia materialo.

Oni petas la alsendon de ekzempleroj de ĵurnaloj, revuoj, informiloj, kiuj permesos al nia organo pluki interesaĵojn kaj sciigi siajn legantojn pri esperantaj eventoj menciindaj.

Al ĉiuj korajn antaŭdankojn!

Correspondendo à aspiração geral, desde há muito sentida, começa a publicar-se NIA BULTENO (O Nosso Boletim), órgão e propriedade de P.E.A.

A título temporário, o seu aparecimento será bimestral. Passará a mensário logo que os recursos financeiros da associação permitam a sua saída regular.

Edição modesta, procurará ser o porta - voz das realizações e anseios colectivos.

Este número foi fortuitamente preparado, antes de ser nomeada a comissão redactorial responsável pela sua orientação.

Entretanto podemos afirmar que nas nossas colunas dar-se-á prioridade a resenhas das actividades associativas dignas de menção e a informações sobre o movimento esperantista internacional.

N.B. será bilingue. A parte em português, destinada a esclarecer simpatizantes e consócios ainda incipientes, visará principalmente a propaganda da Língua Internacional e da obra genial de Zamenhof.

A parte em Esperanto, além de artigos doutrinários, e, possivelmente de uma página literária, terá secções tendentes ao aperfeiçoamento linguístico e à cultura geral e especializada dos esperantistas.

Órgão comum, de todos se solicita o indispensável auxílio material, uma colaboração permanente e sugestões atinentes ao seu melhoramento progressivo.

Na persuasão dum acolhimento favorável, a todos expressamos as nossas saudações fraternas e o nosso sentimento esperantista.

STRANGA SINTENO

Neofte mi vizitas la sidejon de nia Asocio. Ne pro tio, ke la kunesto kun niaj samideanoj estu malplaĉa, tute ne. Cetere, la interno de la sidejo estas sufiĉe komforta, malgraŭ la modesto de la meblaro, same kiel modesta estas la biblioteko, kiu tamen entenas kelkajn valorajn specojn.

Ni ne estas tie izolitaj: privata telefono garantias la komunikaĵojn kun la ekstero, eĉ rekte kun eksterlando pere de speciala numerprefikso.

Baldaŭ tie oni servos odoran kafon, ĉar oni projektas aĉeti aparaton por la preparo de la trinkaĵo. Nur mankas (feliĉe) spaco "por kartludi kaj sorbetadi la nektaron de la noblaj viroj sen edzina ĝenado" -kiel skribis iam nia kara Julio Baghy. Kontraŭe, eĉ kelkaj edzinoj ĉeestas kaj helpas la funkciadon de la Asocio; kaj ni kaptas la okazon por reliefigi la efikan laboron de nia sekretariino, s-anino Olga.

Si estas ekzemplo sekvinda, imitinda, de la uloj malavaraj je paroloj vanaj

Tamen, eĉ la alloga ensemblo de niaj asociaj instalaĵoj ne altiras min. Fakte, mi havas nevenkeblan alergion. Ĝi koncernas la rampantajn bestojn, kiel ekzemple la krokodilojn.

Mi scias, ke tiu aĉa besto vivas en ĉiuj landoj meze de la esperantistoj.... Kelkfoje ili maskiĝas, kiel lacertoj, ruzaj kaj enuigaj. Kaj mi devas averti vin, ke tiaj bestoj naskas ĉiutage kvardekon da ovoj. Mi incitas vin al la detruado de tiuj ovoj!

Nur kun la malapero de la krokodilo mi kuraĝos viziti pli ofte nian sidejon, kie regas tia aĉa besto kun ŝrumpita haŭto kaj ega buŝo. Urĝas, ke ni forpelu ĝin, malgraŭ la ekzisto en ĝi de glandoj ellasantaj odoran moskon. Ni anstataŭu ĝin per la birdo, kiu ĉe ni reprezentas la babilemulojn - la kerniko.

"Eĉ interne de la esperantistaj grupoj oni ofte ne kuraĝas paroli esperante, oni balbutas, oni preferas paroli en sia nacia lingvo - tiel skribis en 1910 nia kara Zamenhof - kiu admonis la esperantistojn paroli "ne sole pri esperanto, sed ankaŭ per esperanto."

José Antunes

COMO PODEM OS POBRES SER RICOS ?

Vamos poupar enriquecendo a nossa cultura ? Leiam atentamente o plano que vos propomos.

Se está interessado na leitura de uma revista (e elas são tantas) procure transmitir o seu interesse aos esperantistas seus vizinhos. O custo da assinatura será rateado entre todos os que constituirão um círculo de leitores e a revista circulará de mão-em-mão até ser consultada por todos. Depois (há tantos papéis lá em casa) poderá remetê-la para o arquivo da Associação.

O mesmo método pode ser aplicado na aquisição das constantes edições que não podemos adquirir pelo seu custo elevado. Constituam o círculo de leitores que sirva a sua vontade de se cultivar e, no final, remetam o livro para a biblioteca da Associação.

Pobres, sim. Incultos, nunca. Defendamos os nossos magros escudos, não abdicando da satisfação dos nossos desejos.

José Antunes

Vivo fariĝas ĉiam pli kaj pli postulema, kaj mi ĝi kirle forglitigas tiel vigle kaj ĉirkaŭpreneme, ke eĉ malmulte da tempo restas al mi por halteti kaj rigardi malantaŭen.

Mi tamen nun perfortas la tiradon kaj detenas min iomete rande de la vivofluo, por medite kaj kritike observi la mondo-iradon...

La homo, nomita reĝo de la animaloj, estas organizita sur tiu ĉi terglobo, sin turnanta en la kosma spaco, en maniero tute ne racia, sed kaosa. Homgrupoj akaparas al si terpecojn kaj klopodas, iel ajn, eĉ permilite; forpreni pecon da tero de la najbaro kaj pligandigi la alproprigitan terspacon. Pro havidemo, konkerintoj subpremis kaj detruis homamasojn dum jarcentoj, rezultante ke la homaro suferis malhumanegajn perfortadojn fare de militemaj malsaĝuloj.

Imperioj stariĝis kaj disfalis, lingvoj naciaj rolis kiel interkompreniloj en pli aŭ malpli granda skalo, kvankam portempe, dum centoj da lingvoj kaj dialektoj diskreskis kiel fungoj post pluvo sur tuta terglobo. Uzantoj de la naciaj lingvoj tiel forte amas sian propran nacian lingvon, ke ili klopodegas fari ĝin universala, komprenante ke tio per si mem donus grandan avantaĝon materian kaj honorigan al sia nacio, kaj ilia naciismo ankoraŭ pli svelus kvazaŭ balono plenega de aero. Ne gravus, se alilandanoj ŝvitegus por ellerni ĝin, plenegas da malfacilaĵoj kaj mallogikaĵoj...

Lingva, rasa, politika kaj religia diskriminacioj ankoraŭ regas en kelkaj lokoj sur la tero. Ankaŭ malsaĝaĵoj kiel ekzemple homamasoj malsate mortantaj tie, kaj homamasoj malsaniĝantaj kaj mortantaj pro troa manĝado alie. Alia senpripensado estas, ke troa grandnombro da homoj amasiĝas sur terpeceto, kaŭzante multajn malbonaĵojn, kiel ekzemple la polucion, dum grandaj terspacoj restas tute sengentaj. Urbegoj, riveroj, kampoj, plaĝoj, vegetaĵoj, bestoj kpt. ĉiam pli veneniĝas per polucio, kaj la homoj devas preni urĝan faron por ŝanĝi la iradon de la aferoj, alie ili devas forveturi rakede al aliaj planedoj.

6
Mi tute ne kredas, ke homo ekaperis sur tiu ĉi tero, sen celo kaj sen plano, tute hazarde. Mi eĉ ne kredas pri ekzisto de hazardo, sed oni ekuzis tiun vorton por oportuno, kaŝanta la homan nescion. Ĉiu efiko certe havas sian kaŭzon, sed ofte ĝi ne estas facile konstatebla. Do, laŭ mi la homvivo devas havi sian celon, kaj la kaŭzofaris tiun efikon de la homvivo.

La Homaro, same kiel homido, havas sian propran infan- jun- kaj plenaĝon, kaj ankaŭ kiel homido, dum tiuj longaj tempdividoj la homaro faras bubajojn, infanaĵojn kaj ankaŭ friponaĵojn. Oni diras ke la homaro nun proksimiĝas al sia plenaĝo, kaj ke ĝi, post finatingo de tiu mezaĝo, komencos forlasi malsaĝaĵojn, proprajn al junajĝoj. Se tio estas fakto, vere multaj saĝaj movadoj en la nuntempo montriĝas aktivaj kaj klopodas vekti la kunhomojn, kaj montri al ili la irendan vojon, kondukanta al paco, justeco por ĉiuj surbaze de egalrajteco, ĉu seksa, rasa, klasa, socia, lingva, religia kaj monrigarda.

Naciismo, adorita ĉevaleta de multaj, iom post iom estas anstataŭigita de sennaciismo, tutmondismo, religia fanatikeco kaj ekskluzivemo ŝanĝiĝas je ekumenismo kondukema al unureligieco, tio estas adorado al unu sola, sama Dio en unueco. Nacioj klopodas unuiĝi en ĉiam pli grandaj unuoj, kaj kelkaj unioj komencas apereti, kaj certe pli kreskos estonte. Nacilingvoj klopodegas fariĝi internaciaj, sed ĵaluzemo malhelpas al ili atingi tion, dum la tempo de venko de Esperanto estas ĉiam pli kaj pli proksima, ĉar tio estas la sola justa, praktika kaj racia solvo de la lingva problemo sur la tuta terglobo.

Ni, la esperantistoj, devas havi fidon pri la estonta venko de Esperanto kaj ne senkuraĝiĝi. Oni devas kompreni ke la evoluprocezo de la homaro estas longdaŭra, tio signifas ke ni, la esperantistoj, ne devas esti tro rapidemaj sed paciencaj kaj eltenemaj, ĉar nia venko nepre venos, se ne por ni mem, certe por la venontaj generacioj, do ni estu malegoismaj koncerne nian propran rapidan venkon.

Mi forte esperas, ke regantoj de la mondo finfine saĝiĝos, finfine raciigos la studadon, normigos pezojn, mezurojn, monerojn, kalendaron universalan, kaj establos la universalan Esperanton sur la tuta terglobo. Ĉu songe? Jes... sed Vekite!

12-a Jan 1887

Naskiĝis Jorge Anibal de Saldanha Carreira, la plej fervora portugala propagandisto de Esperanto, de ĉiuj tempoj. Lia agado estis multobla kaj tre varia; lia kunlaboro kaj en prozo kaj en verso aperis en multaj esperantaj publikaĵoj. Li estis kunaŭtoro, kune kun Luzo Bemaldo, de Elementa Kurso de Esperanto.

14-a Jan 1974

Mortis Bernardino Martins de Almeida, konita en la esperanta Movado per la pseŭdonimo Luzo Bemaldo. Li estis la prezidanto de la unua Portugala Esperanto-Asocio. Dise li postlasis multajn artikolojn kaj poemojn, kaj en la portugala kaj en la esperanta lingvo. Li estis posedinto de neulgara kulturo.

7-a Feb 1934

Mortis, en Varsovio, d-ro Leono Zamenhof, frato de la iniciinto de Esperanto. Li verkis diversajn verkojn pri medicino kaj multajn originalajn poemojn. Li aktive partoprenis en ĉiuj faktoj de la loka esperanta Movado.

19-a Feb 1863

Naskiĝis Emilio Grosjean-Maupin, mezlerneja instruisto. Li estis la plej notinda leksikologisto de Esperanto. Lia duo de vortaroj Esperanto-Franca kaj Franca-Esperanto estis kompleta kaj fidinda. Li estis la ĉefa aŭtoro kaj estro de Plena Vortaro aperinta en 1930, historia limŝtono en la esperanta leksikologio.

27-a Mar 1906

Mortis Aleksandro Silbernĉik, bopatro de Zamenhof. Spite tion, ke li ne estis riĉa, li ebligis la eldonadon de la unuaj broŝuroj pri Esperanto, kaj dum 15 jaroj li monhelpis la heldonaĵojn de sia bofilo.

31-a Mar 1920

Mortis Hektoro Hodler, sveda, unu el la fondintoj de UEA, kies direktoro li estis. Laŭ lia opinio, la Movado de la internacia lingvo ne devas sin disigi disde la aliaj movadoj konstrue socialaj. Por ke la ekzistado de UEA estu asekurita, li postlasis la plej konsiderindan parton de siaj havaĵoj.

NI PROFITU ĈI TIUN OPORTUNECONI

Akorde kun la Programo de MFA, la lando estas denorde suden skuigita de granda disvastiga kultura kampanjo, fare de urbodoma komitatoj kunkune la helpo de la Armeo.

Teatraj spektakloj, prezentadoj de kino kaj muziko, klarigaj kunsidoj, ktp, ktp, estas hodiaŭ eblaj en kiu ajn landa loko. Tamen ne apenaŭ el la kultura spektaklo konsistas la programoj de tiuj komitatoj. Oni scias, ke samtempe oni pensas starigi kulturajn aktivecojn plispecifajn, celante ne plie la homamason, sed la individuojn.

Tio estas la kazo de alfabetumaj kampanjoj, teatraj grupoj, gimnastikaj sportaj aktivecoj, kinoklubo, sakludo-aktiveco, kaj multaj aliaj. Nu, ni pensas ne erari, certigante, ke en ĉi tiu perspektivo de kultura disvastigo, nia Esperanto havas lokon okupendan.

Se antaŭ la 25-a de Aprilo la ideo estus utopia, hodiaŭ estas ĉe niaj manoj esplori la potencialecojn, kiuj malavare estas donacitaj al ni de la registaro. Ĉar se estas fakto, ke en la plejmulto de la urboj kaj vilaĝoj oni ne trovas ununuran esperantiston, ankaŭ estas vere, ke en aliaj ekzistas unu aŭ du disĉiploj de Zamenhof.

Nu, se en tiuj lokoj, oni starigis urbodoman kulturenan komitaton, tiele ke nia samideano proponu siajn servojn por la disvastigado de la internacia lingvo.

Ke la propono estas bone akceptota, tion ni povas certigi, laŭ nia propra sperto. Profitante la kreon de la menciita kultura komitato en nia komunumo, ni proponis Esperanton kiel unun el la eblaj studotemoj. La sugesto estis akceptata, kaj ni fieras, ke ni vidas sur la Oficiala Dokumentaro la vorton Esperanto flanke kaj samegalece kun aliaj konsekritaj kaj tradiciaj laboroj.

Ĉi tiu afero estas la ekzemplo de nia sperto, kiun ni volas sugesti al ĉiu esperantisto konscia de sia respondeco kaj de la unika okazo de aktuala momento.

Ke ni ne perdu tiun okazon! NI PROFITU ĈI TIUN OPORTUNECON !

A. Vaz Velho

L A S T H O R E

Estis interkonsentite inter la Organiza Komitato kaj la estraro de P.E.A. ke ne okazu la Kongreso anoncita por la nuna jaro en Braga. Anstataŭe niaj samideanoj de Porto sin proponas okazigi esperantistan renkontiĝon, je dato interkonsentota. Kiu jam pagis la kotizon por la Kongreso rajtas rehavigi ĝin.

.....

Nia samideanaro sciu ke ĉiujn ĵaudojn je la 18-a ĝis la 20-a okazas kaftrinkado ĉe Kafejo Paladium.

.....

Nederlanda samideano prelegos ĉe nia sidejo je la proksima Aprilo. Interesatoj informiĝu pli proksime pri la ĝusta dato ankoraŭ interkonsentota.

.....

Ĉiujn merkredojn de la 21-a ĝis la 22-a kaj duono nia sidejo estas je la dispono de la membraro kaj simpatiantoj. Vizitu ĝin amase, profitante la okazon por uzi nian lingvon. Tiel vi pli multe majstros Esperanton kaj al la vizitantoj vi pruvos la vivecon de nia lingvo. Nian sidejon estigu preferata renkontiĝejo.

O RESSURGIR DO ESPERANTO NO PORTO

Depois do longo silêncio de muitos anos, o movimento esperantista do Porto dá os primeiros passos no sentido do seu ressurgimento.

Ainda que fieis ao ideal de uma segunda língua para todos os povos da Terra, os esperantistas do Norte, por razões de todos conhecidas, dispersaram-se, cessando toda a actividade proselitista e consequentemente a renovação de pessoas e quadros indispensáveis a qualquer movimento. Só no final de 73 foi possível abrir um primeiro curso elementar, e isto após o constante apelo da Direcção da Associação Portuguesa de Esperanto. Em Setembro de 1974 teve lugar no Porto uma reunião de antigos esperantistas e simpatisantes, na qual ficou assente a criação de uma Delegacia daquela Associação e a abertura de novos cursos.

Assim, no mesmo mês começou o curso da Foz, a que se referiu inesperadamente a Televisão. Depois, em Outubro, tivemos a visita do Grupo de Vigo "Paco kaj Amo", com o qual alguns elementos do Porto mantinham de há muito contacto. Neste encontro abordaram-se problemas de interesse comum, ficando desde logo assente que em Dezembro o Porto retribuiria a visita. Segue-se todo um demorado trabalho de preparação da homenagem póstuma ao Dr. César Anjo, constituída pela edição de um modesto in-memorian, largamente espalhado por todo o país, e uma concentração no cemitério dos arredores de Santa Comba Dão, onde está sepultado aquele inesquecível lutador. Também aqui a Televisão compareceu, transmitindo algumas imagens da cerimónia.

Entretanto, abriu em Águas Santas, Maia, o terceiro Curso.

E no dia 6 de Dezembro, José Antunes, realiza no Clube Fenianos Portuense uma conferência sobre o Esperanto e a Democracia.

Finalmente, nos dias 14 e 15 de Dezembro tem lugar a excursão a Vigo, na qual participam esperantistas, simpatisantes e alunos dos vários cursos, num total de 49 pessoas.

11

A nota mais curiosa resultou do acolhimento a todos dispensado e sobretudo dos cuidados que aos rapazes e raparigas do Curso da Foz foram prodigalizados pelos associados de "Paco kaj Amo", dos quais foram hóspedes. Destas breves notas resulta, sem dúvida, o facto de em pouco mais de três meses ter sido realizado um intenso trabalho, cujo primeiro objectivo visou arrancar do esquecimento o Esperanto. . .

Impõe-se agora reavivar o interesse associativo, base indispensável a ulteriores trabalhos.

Todos os esperantistas e simpatizantes estão a ser directamente contactados, para prosseguimento da arrancada iniciada em Setembro.

CAMPANHA DE INFORMAÇÃO

No Encontro de Montemor-o-Novo apresentámos, a pedido de um Dirigente da Associação Portuguesa de Esperanto, algumas sugestões que visavam o alargamento da acção divulgadora da Língua Internacional e do movimento que a apoia.

Propúnhamos, entre outras iniciativas, a criação de uma Comissão de Informação, que teria como uma das suas principais tarefas a de fazer publicar através do País, nos jornais ou revistas que o desejassem, a título esporádico ou periódico, artigos e notícias favoráveis ao Esperanto.

Esta colaboração seria elaborada pela Comissão de Informação ou por seus eventuais colaboradores e poderia apresentar várias formas, tendo em atenção as características das publicações onde fosse acolhida. Com artigos originais, traduções de revistas esperantistas ou de documentos de adequado valor informativo, opiniões de celebridades em todos os campos da cultura, sobre o Esperanto ou sobre a ideia da Língua Internacional, notícias sobre congressos e actividades culturais, haveria uma maior possibilidade de esclarecer uma parte do povo sobre os nossos objectivos.

Temos que reconhecer que devido às condições fortemente desfavoráveis em que durante tão longo período o movimento esperantista viveu entre nós, há uma grande parte da nossa população, até mesmo pessoas com razoável grau de instrução, que desconhecem a existência do Esperanto. Outros indivíduos há que, embora com um bom nível de cultura, tem uma noção deturpada do que é a Língua Internacional. Nunca poderemos esquecer o caso elucidativo de uma professora do ensino secundário, que à vista de uma obra em Esperanto, exclamou: "Então o Esperanto tem um alfabeto como as outras línguas? E eu que pensava que o Esperanto era representado por hieróglifos!!! "

Ora julgamos que há neste momento, no nosso País, condições para que as pessoas venham a interessar-se pela nossa Língua, se se fizer um largo trabalho informativo.

Já noutro lugar apelámos para a colaboração dos nossos Associados em várias iniciativas de interesse. Pois vimos agora pedir a cooperação de todos para as seguintes tarefas imediatas:

a) Todos devem entrar em contacto com revistas ou jornais regionais, indagando da possibilidade de inserirem a colaboração a que atrás aludimos e, em caso de aceitação, saberem qual o nível e a periodicidade dessa colaboração, (se isolada ou permanente);

b) Devem dar-nos a própria opinião sobre o nível da publicação contactada, enviando-nos, se possível, um exemplar de jornal ou revista em questão;

c) No caso de não aceitação da colaboração a fornecer pela Comissão de Informação, devem indicar-nos qual o motivo alegado para a recusa.

Não devem ser esquecidos os pequenos boletins de Cooperativas, Sindicatos, Clubes Culturais ou Recreativos ou outras Associações, e até mesmo jornais de parede, pois frequentemente há possibilidades de inserir neles colaboração de interesse cultural.

Julgamos que o modo como os nossos Associados reagirem a este nosso apelo poderá influenciar a possível criação e estruturação da Comissão de Informação, a que atrás aludimos.

Insistimos em dizer que só a cooperação efectiva de todos os esperantistas portugueses pode levar à prática esta iniciativa que reputamos da maior oportunidade. Todos devem mostrar o maior interesse por tudo quanto diz respeito ao nosso movimento, para que possa ser desfeita a opinião pessimista de que os "samideanoj" portugueses não estão dispostos a fazer algo pelo triunfo do Esperanto.

J. F. M.

PRI NIA LITERATURO

Kelkfoje ni estas legintaj artikolojn de respondecaj elementoj de nia Movado, en kiuj oni montras la malkontentecon pri la fakto, ke ĝenerale la esperantistoj ne plene korespondas al la verkaj entreprenoj en la internacia lingvo.

Fakte oni konstatas, ke multaj esperantistoj povantaj akiri la verkonjn, kiuj estas publikigitaj, ili ne tion faras oftece, montrante mankon je scivolemo pri kelkaj verkoj, kiujn ili devas ne nur apogi, sed ankaŭ havi intereson aĉeti.

Oni diras multfoje, ke la esperantaj verkoj estas multkostaj, despli ke ilia prezo estas plialtigita pro akiro en eksterlando, sed ankaŭ estas vere, ke verkoj je normalaj prezoj aŭ eĉ malmultekostaj estas akceptitaj kun apatio, kiu malkuraĝigas tiun kiu volas sin dediĉi al tasko, kiu estas de fundamenta merito por nia Movado.

Kiel ekzemplon ni ne povas ne mencii verkon, kies prezo estas pli ol modesta: "Oriento kaj Okcidento - al reciproka kompreno?". Ĉi tiu malgranda verkaĵo estis eldonata de UEA, kun la helpo de UNESCO. Sed malgraŭ tio, ke ĝi estas publikigita antaŭ kelkaj jaroj, ĝi ne estas ankoraŭ elĉerpita.

Rimarku kion oni diras pri tio, en la estrara raporto de UEA, rilatanta al jaro 1972:

" Estas preskaŭ nekredeble, ke ĉi tiu valora libro ankoraŭ ne estas tute vendita. Pro tio, demomente ne eblas klopodi eldoni alian similan verkon".

Tio volas diri, ke UNESCO ne subtenos eldonon de iu ajn alia libro, ĉar la esperantistoj ankoraŭ ne elĉerpis ĉi tiun modestprezan legindan verkaĵon. Ĉu la esperantistoj jam rimarkis la prestiĝon kiun gajnos nia Movado, se UNESCO povus subteni sinsekvajn eldonaĵojn en la Internacia Lingvo?

Krom tio, evidentiĝas, ke unu la plej bonefikaj rimedoj reliefigi la validecon de nia lingvo, nome en la intelekta medio, estas la dismontrado de vere valoraj, en ĝi publikigitaj.

Do, estas kazo por alvoki la atenton de la portugalaĵ esperantistoj al la verkoj eldonitaj en la Internacia Lingvo.

Esperanto, oni povas aserti, havas senduban kulturan valoron kaj nenio estas plibona por tion pruvi, ol la ekzisto de vasta literaturo kaj originala kaj tradukita.

Tradukitaj en Esperanto ekzistas verkoj de plej bone konataj verkistoj, tiel poezie kiel proze, kaj jam reliefigas la kvanto de verkoj pri ĉiuj temoj, kiel oni povas vidi per simpla trarigardo tra la katalogo de vendotaj eldonaĵoj.

Kun granda ĝojo ni registras la fakton, ke dum la lastaj vizitoj kiujn faris al sidejo de nia Asocio, ni rimarkis kelke da vendendajn verkojn, en ties monrejo.

Tiamaniere ni instigas niajn samideanojn regule aĉeti esperantajn librojn, ĉar tio estas efika maniero pligrandigi nian Movadon.

J. F. M.

Assembleia Geral Ordinária**CONVOCATÓRIA**

Nos termos e para os efeitos do artigo 15-, alínea a), do Estatuto desta colectividade, convoco os Sócios a reunirem no dia 5 de Abril do corrente ano (sábado), às 15,30 horas, na sede social, Rua Dr. João Couto, lote 1238, r/c A, à Av. Marechal Carmona, em Benefica, com a seguinte

ORDEM DE TRABALHOS

- Discutir o Relatório, as contas e os actos de Gerência de 1974, assim como o parecer do Conselho Fiscal, e resolver em conformidade.

Se não houver número legal de presenças, a Assembleia funcionará em 2-a convocação, com qualquer número de sócios, uma hora depois, no mesmo dia e local e com a mesma ordem de trabalhos.

Lisboa, 1 de Março de 1975

O Presidente da Assembleia Geral

(a) José Santos Ferreira

CORPOS SOCIAIS DA P. E. A. PARA O BIÊNIO DE 1975 - 1976

MESA DA ASSEMBLEIA GERAL

- Presidente - José dos Santos Ferreira
 1.- Secretário - Jaime de Matos Correia
 2.- Secretário - João Correia Marques

DIRECÇÃO

- Presidente - Alberto Pedro da Silva
 Vice-Presidente - Eng.- Adelino Franco Simões
 Secretário - D. Olga Serra Marques de Almeida
 Tesoureiro - António Ribeiro da Cruz
 Bibliotecário - D. Maria Luísa Niny Mexia
 Vogal - Abel de Almeida Freire de Oliveira
 Vogal - Tomás Rocha da Costa
- Substitutos - José de Freitas Martins
 - Joaquim Marques Mendonça
 - Francisco Pires
 - João Augusto Baptista

CONSELHO TÉCNICO

- Efectivos - Manuel de Freitas
 - Dr. Adriano Joaquim Vaz Velho
 - Virgílio Campos Portela
- Suplentes - José Augusto de Castro
 - Cap. José dos Reis Pires
 - Eduardo Augusto da Mota Padrão

CONSELHO FISCAL

- Efectivos - Glicínio de Moraes Rebelo
 - D. Maria Amélia do Amaral Macedo
 Nunes
 - Major Sebastião Gomes de Oliveira
- Suplentes - Fernando Domingos da Costa
 - Abílio Pereira Baltasar
 - José Vieira Gonçalves Graça